

# KONTAKTO

numero 149 (1995:5)

## 100 JAROJ DA LUMO KAJ MOVO

● La edukado en Niĝerio  
**SUB MINACO DE LOGIOJ**

● Novelo de Ulrich Matthias:  
**LA ĜISOSTULO**



Ni esploru pri  
**OVODEMETANTA  
HOMARO**

Provu vian fortunon  
per **EKSTERTERAJ  
LINGVOJ EN KINO**

Intervjuo kun  
**NOVA SUDAMERIKA  
REĜISORO**





Ovodemetanta homaro	Bernard Golden, Hungario	2
Vulpo kaj tigo	Zhang Xuesong, Ĉinio	3
100 jaroj da lumo kaj movo	Peter Schepelem, Danio	4
La baleno de Juan Carlos	intervjuo kun Juan Carlos Valdivia	8
Kristnasko en malnova Rusio	Irina Aleksejeva, Rusio	8
Provu vian scion...	Claus Günkel, Germanio	9
Kaŝa Niĝerio	Ōshó-Davies Olúwábúnmi, Niĝerio	10
Tribaj nomoj de Akano	Yaw Ampomah Badu Frempong, Ganao	11
La ĝisostulo	Ulrich Matthias, Germanio	12
La bona ingo		13
Neniu ploras en Samarkando	Maria Sandelin, Finnlando	14
Ne mortu sen diri, kien vi iros	Franĵo Veuthey	14
Blindulo klarvidanta	Poul Thorsen, Danio	15
Tentaklo		15
La plej juna leganto de KONTAKTO	Roel Haveman, Nederlando	15
Koloro	Barrios, Hispanio	16

## KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de  
Tutmonda Esperantista Junulara  
Organizo (TEJO), eldonata de  
Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 149 (1995:5), 32-a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por  
blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176,  
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;

☎ +31 10 436 10 44;

☎ +31 10 436 17 51

✉ uea@inter.nl.net

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Aleksejeva (Rusio)

Felip Artero i Lozano (Katalunio)

Zoran Ĉirić (Serbio)

Alberto Garcia Fumero (Kubo)

Bernard Golden (Hungario)

Claus Günkel (Germanio)

Ludmila kaj Piotr Malicy (Pollando)

Kizeyidioko Mayinda (Zairio)

Atilio Orellana Rojas (Argentino)

Ōshó-Davies Olúwábúnmi (Niĝerio)

Anna Rachoń (Pollando)

Ilkka Santtila (Finnlando)

Uatanabe Kei (Japanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy


Provlagado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilingvaj artikoloj estas verkita  
en la niveloj tre *facila* kaj *facila*, laŭ la  
vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas  
en la unua numero ĉiujare.

Anonctarifo:

Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld.,  
kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185  
gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterakviritaj  
anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe  
ripetita anonco (ne anonceto!) en  
sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de  
20%. Por movadaj instancoj: 50%  
rabato. Varbantoj de ekstermovadaj  
anoncoj ricevas maklerajon de 30%  
el la prezo de la koncerna anonco.  
La abontarifo varias laŭlande.  
Petu informojn de la supra adreso.



## enkonduko

Ĉi-foje nia kovrilo salutas vin  
per sceno de METROPOLO  
(Germanio, 1927), klasikaĵo  
de la sensona kinepoko,  
reĝisorita de Fritz Lang por la  
Babelsberg-Studioj. Tiu sama  
kinisto filmis LA MIL OKULOJ DE  
D-RO MABUSE surbaze de la  
originala Esperanta romano  
MR. TOT AĈETAS MIL OKULOJN de  
Jean Forge. Interese, ĉu ne?

Eble vi jam rimarkis, ke  
lastatempe mi enkondukis  
tradukitajn artikolojn — krom  
la kutimajn de Zoran. Tio  
okazas pro propono de la  
TEJO-estraro, kiu opinias, ke  
ni tamen ne rifuzu ion de la  
ekstera mondo, se tio taŭgas  
por nutri nin — prave, ĉu ne?  
Kompreneble, tiuj tradukoj  
restu eta parto de la revuo —  
ne kiel nun, kiam la ĉef-  
atikolo estas traduko  
(terurajo!). Sed tio havas  
klarigon: Tutan jaron mi  
persekutis kandidatojn por  
verki ion pri la centjariĝo de  
kino — senrezulte. Mem provi  
verki — ho ve. La nuna tamen  
estas majstroverko konside-  
rante la amplekson kaj  
kompleksecon de la temo.  
Bedaŭrinde mankis spaco por  
angulo pri kino kaj Esperanto  
sed prefere ni donu pli indan  
lokon al tio en venonta  
numero. Kiu  
povos verki?

*Franĵo*

# Ovodemetanta

**Ĉu ne estus pli avantaĝe por homa  
reproduktiĝo la nasko pere de ovo?  
Ni komencu per mallonga leciono pri  
mamula sistematiko.**

Unu el la karakterizaj trajtoj de la superaj mamuloj estas la nasko de vivantaj idoj. Ili apartenas al la subklaso de placentuloj, ĉar la embrio antaŭ nasko estas ligita al la patrina utero per nutranta organo nomata placento. En pli primitiva evolustadio estas la senplacentuloj, kiel marsupiuloj kaj kloakuloj. En la unua ordo troviĝas vivonaskaj mamuloj, kies idoj restas en la patrina marsupio aŭ ventra haŭtpoŝo, kie ili suĉas nutraĵon el la tie situantaj mametoj. Ankoraŭ pli primitivaj mamuloj apartenas al la ordo de monotremoj aŭ kloakuloj (ekidnoj kaj ornitorinkoj). Iam ili estis troveblaj en multaj landoj, sed hodiaŭ la *habitato* aŭ loĝteritorio de la ekidnoj estas en Aŭstralio kaj Novgvineo, dum la ornitorinka genro estas izolita en Aŭstralio. Tiuj bestoj similas al siaj pratipoj, la reptilioj, kiuj demetas ŝelkovritajn ovojn. Ili, do, diferencas disde aliaj mambestoj, ĉar la ĝermoj de iliaj idoj ne maturiĝas interne de la patrina korpo sed ekstere, en ovoj demetitaj en neston. La procedo similas al tiu de la klaso de birdoj, kiuj ellasas ovojn kovritajn de kalkeca krusteto por protekti la embrion. Post elkovado fare de la patrino, la juna besto bekpikas la ŝelon kaj elrampas. Okazis, do, unudirekta evoluo de ovodemetantaj bestoj, kies idoj maturiĝas ekster la korpo de la patrino, ĝis mamuloj, kiuj nutras la kreskantan feton dum relative longa gravedtempo per placento en interna parto de la korpo — la utero.

**Kiu procedo, ovonaska aŭ vivonaska, estas pli praktika por la homaro?**

La aktuala disvolvigo de biologio kaj genetiko ne permesas plenumadon de laboratoriaj eksperimentoj por respondi la demandon. Tamen, en verkoj de sciencfikcia kaj fantazia literaturo oni povas trovi priskribojn de plej superaj mambestoj, kiuj estas ovodemetantaj.

**La francino, kiu ellasis ovojn**

Étienne Gril, franca aŭtoro de sciencfikciaj romanoj, en sia amuza verko *L'ovipare* (La ovonaskantino), eldonita en 1942, rakontas pri knabino en familio de la malalta franca nobelaro, kiu demetis unu ovon ĉiujn 28 tagojn. Post kiam la junulino ricevis infanon, oni regule kuiris la ovon de la monato dum tri minutoj, por ke povu naskiĝi ido. Se oni ne volis infanon, sufiĉis lasi la ovon en la bolanta akvo ĝis ĝi kuirigis malmola. La infanoj — entute 25 — de la unua kaj unika ovonaska virino, bonŝance estis vivonaskaj. Pro la kapablo produkti unu infanon ĉiun monaton, tiu virino fariĝis minaco por la mondo, krom se iu lando volis pligrandiĝi demografie. Sur la kovrilo de la libro estas bildo montranta junan virinon sidantan en korbo, kvazaŭ ŝi kovus siajn ovojn. En levita mano estas rompita duonŝelo, de kiu eloviĝas infano.

# anta homaro

— Bernard Golden, Hungario

## Bildo pri ovonaska homaro en la fora estonteco

George Bernard Shaw, la tre konata aŭtoro de teatraĵoj, publikigis en 1921 *Back to Methuselah* (*Reen al Metuŝelah*). En tiu dramo disvolviĝas longa serio da eventoj en la historio de la homaro ekde la komenciĝo de la mondo en 4004 a.K. (teologie kalkulita laŭ donitaĵoj de la Biblio) en la ĝardeno de Edeno, ĝis la jaro 31920, kiam homoj estas ovonaskaj. Shaw priskribas la traktadon de enorma ovo lokita sur altaro. Maljunulino dispartigis la ovoŝelon per segiloj, kaj elvenis beleta knabino, kiu en niaj tagoj aspektus kiel 17-jarolino. La maljunulino klarigis, ke ŝi kreskis du jarojn en la ovo, trapasante filogenezan resumadon de ĉiuj primitivaj stadioj de evoluo en 15 monatoj; sekve venis disvolviĝo, kiu iam kostis al homoj 20 jarojn da stumblanta nematuriĝo, post ilia naskiĝo. Kvankam ŝajnas, ke Shaw priskribas retroevoluo de la homaro al la stadio de la monotremoj, li lerte argumentas, ke ovonaskado estas pli avantaĝa reproduktiĝa maniero, ĉar ĝi ebligas akceladon de maturiĝo de individuoj kaj liberigas patrinojn de la ŝarĝo de gravedeco.

## Ovonaska reproduktiĝo sur la planedo Marso

Tre detala priskribo de ovonaska reproduktiĝo troviĝas en la romano *Princino de Marso* de Edgar Rice Burroughs, publikigita en 1917 (versio en Esperanto aperis en 1939). La marsaj regantoj tre raciigis infanbredadon sur sia planedo. Ĉiu plenkreska marsanino demetis proksimume dek tri ovojn ĉiujare. Ili estis rondformaj, neĝe blankaj kaj havis diametron de unu metro. Ovoj, kiuj taŭgis

laŭ grandeco kaj pezo, estis kaŝitaj en malvarmaj subteraj kavernoj por malebligi kovadon. Ĉiujare konsilantaro ekzamenis la ovojn kaj detruis el la provizo ĉiujn krom la cent plej perfektaj. Post kvin jaroj la 500 selektitaj ovo estis metitaj en hermetajn kovilojn kun vitra tegmento, por ke ili elkoviĝu per sunradioj post kvinjara periodo. Kapitano Johano Carter, usonano, kiu vojaĝis al Marso, edzinigis Deja Toris, princinon de Heliumio. Ilia ido en la formo de neĝblanka ovo kuŝis en ora kovejo sur la tegmento de la palaco. Bedaŭrinde, Carter neniam vidis la eloviĝon de sia ido, ĉar li estis devigita reiri al la Tero.

## Androidoj el ovo laŭ moderna alkemia procedo

Jean de Quirielle, alia franca aŭtoro de sciencfantazio, en sia verko *L'œuf de verre* (*La vitra ovo*), kiu aperis en 1912, priskribas vitran ovon, en kiu troviĝas plenkreskulo en feta pozicio, okupanta la tutan spacon de la interno de la ŝelo. La du duonoj de tiu granda ovo estas kunfiksita per meza bendo, kaj ĉe la pli granda finaĵo de la ovo troviĝas speco de elektra ŝtopilingo kun du spiralaĵoj dratoj. Efektive temas pri laboratoria produktado de homa estulo en artefarita ovo sen bezono de femala demetanto. Similajn eksperimentojn faris alkemiistoj de pasintaj jarcentoj por provi krei en retortoj specon de hometo — al kiu estis donita la nomo homunkulo — per kunmiksado de kemiaj elementoj kaj organikaj substancoj. La vitra ovo funkcias sammaniere per aplikado de elektra energio, kaj la rezulto estas *androido*, aŭtomato kun normale granda homa formo kaj aspekto.

# Vulpo kaj tigro

— Zhang Xuesong, Ĉinio

Tigro\* mal-satis\* kaj serĉis bestojn por manĝi. Li kaptis vulpon\*. La vulpo diris: "Ĉu vi kuraĝus\* manĝi min?! Min respektas\* ĉiuj bestoj laŭ la volo de Dio. Se vi manĝas min, vi malsekvas lian volon. Se vi ne kredas al mi, mi iros antaŭ vi kaj rigardu, ĉu la bestoj estos kuraĝaj ne foriri de mi!"

La tigro pensis, ke eble la vulpo diras la veron. Tial li sekvis ĝin kaj la bestoj, kiuj vidis tigron post vulpo, kun granda timo forkuris. La tigro ne sciis, ke la bestoj forkuras pro timo de li mem, ne pro respekto al la vulpo.



**kuraĝi:** ne perdi sian forton antaŭ la malfacilaĵoj

**respekti:** havi altan opinion pri ies valoro

**sati:** esti kontenta pri tio, kion oni manĝis

**tigro:** granda afrika/azia katbesto (*kato*= hejma besto, kiu diras "miaŭ")

**vulpo:** samfamiliano de *hundo* (*hundo*= hejma besto, kiu diras "ŭa-ŭa-ŭa")

## Takso de la procedoj de ovonaskado kaj vivonaskado

Bedaŭrinde, la cititaj aŭtoroj ne provizis la legantojn per ĉiuj necesaj donitaĵoj por ebligi decidon pri la praktikeco de ovumado, kaj ĉu ĝi vere estas supera reproduktiĝa procedo por la homaro. Oni scias pri la ofteco de ovogenezo kaj ovumado nur ĉe la francino (unufoje en 28 tagoj) kaj sur Marso (proks. 13 fojoj en jaro). Ambaŭ periodoj estas ekvivalentaj al la nuntempa femala menstrua ciklo. Detaloj pri tiu grava afero estas preteratentitaj de G. B. Shaw en lia teatraĵo. La daŭro de kovado diferencas inter la homoj en la 320-a jc, kiam ĝi estas du jaroj, kaj ĉe la marsaninoj, kiuj devas atendi kvin jarojn. Unue, tiu tempodaŭro estas relative longa kompare kun la enutera gravedeco de nur naŭ monatoj por virinoj nuntempe. Due, la plej granda malavantaĝo de demetitaj ovo estis ilia elmetado al riskoj de damaĝo kaj pereigo. En la priskribo de samtempa kovado de 500 marsidaj ovo, estas akcentite, ke la kovilo devas esti metita en kaŝitan lokon, ĉar ĉiam estas la danĝero de detruo fare de malamikoj aŭ naturaj fortoj. Tiel, ŝajnas, ke ovodemeta reproduktiĝo ne donas tute favorajn rezultojn. Oni, do, aŭ daŭrigu la ĝisnunan evolutendencon de vivonaskaj mamuloj, aŭ ekspluatu la procedon de kreado de androidoj en vitraj ovo. Tio ja estas la plej ekonomia kaj kontentiga farmetodo. Ĉar tiuspecaj ovuloj jam estas adoltoj, kiam ili elŝeliĝas, ne estos necese malŝpari multe da tempo kaj fortostreĉo por nutri kaj eduki ilin, kiel estas la kazo kun nematuraj idoj. □

tre  
facila

ĉu ne?

FRANĈJO 95

3

n-ro 149 (1995-5)

KSTIATKO



# 100 JAROJ DA U

**Ŝanceliĝante jam de la komenco inter mon-ŝpinado kaj kreivo, kino faris longan vojon ĝis atingi akceptiĝon kiel arto plenrajta.**


**T**ra la tuta longo de sia unua jarcento kino ĝuis enorman sekvadon, sed ĝi ankaŭ estis timata kaj malestimata. La klera burĝaro same kiel la laborista publiko ekscitiĝis pri la spektakloj kinematografaj de la fratoj Lumière en Parizo kaj kinetoscopaj de Edison en Novjorko fine de la pasinta jarcento. Baldaŭ, tamen, la kultura establitaro ekkonsciis pri la enorma populareco de la nova rimedo kaj komencis senkreditigi ĝin kiel vulgaran kaj eĉ malutilan simpton de moderneco.

“La kino enkorpiĝas la plej malbonan popularan idealon”, skribis la franca verkisto Anatole France (1844-1924). “Ne estas la fino de la mondo, sed estas la fino de la civilizo”. Lian opinion reeĥis lia germana nobel-premiita kamarado, la romanisto Thomas Mann


*“Elektra teatro... deca kaj rafinita, plaĉanta al damoj...”  
persvadas tiu ĉi turneanta spektaklo en Kansaso (Usono) en 1910.*

*KABINETO DE D-RO CALIGARI,  
verŝajne la unua hororfilmulo (Germanio, 1919).*

*“Zootropo”, unu el la prauloj de kino, kreita de William Horner (1786-1837).*



*ELIRO DE LABORISTOJ DE LA FABRIKO LUMIÈRE (Francio, 1895), unu el la unuaj filmuloj de Louis Lumière.*



plej bona provo, la kino restas simpliga rimedo” kaj en la nuna jardeko, la elstara reĝisoro Krzysztof Kieslowski diris: “La celo estas kapti kio kuŝas interne. Sed ne estas maniero filmi tion. Literaturo povas, la kino ne. Ĝi ne povas ĉar ĝi ne havas la rimedojn. Ĝi ne estas sufiĉe inteligenta.”

Kiom longe tiaj pri-kinaj opinioj restos pravaj?

## RAKONTOJ DE LA REVO-FABRIKO

En la unua publika prezentado de fratoj Lumière en Parizo, la 28-an de decembro 1895, estis montrita mallonga filmulo pri knabo, kiu ĝenas akvumantan ĝardeniston. La petolulo igas la ĝardeniston ŝpruci sin mem kaj fine ricevas sian propran repagon. Tiu ĉi frua filmeto, *Akvumisto akvumata (L'Arroseur arrosé)*, ekstampis tion, kio iĝos la ĉefa allogo de filmo: ties kapablo rakonti historiojn en pova kaj populara maniero.

La genro komenciĝis ĉefe kiel esprimo-formo bazita sur imitado de teatro kaj pentrado, sed

(1875-1955), kiu diris: “Ŝajnas al mi, ke la kino havas tre malmulton por fari kun arto”. La franca romanisto Georges Duhamel (1884-1966) kaj multaj aliaj recenzistoj vidis la filmarton kiel simpton de “usonigo”, de vulgarigo de la eŭropa spirito.

Eĉ antaŭnelonge, en 1961, la usona historiisto Daniel J. Boorstin skribis, ke “Eĉ en sia





# UMO KAJ MOVO

Peter Schepelern, Danio

THEATRE  
MORAL  
AND REFINED  
PLEASING TO  
LADIES,  
AND GENTLEMEN  
AND WOMEN.



KIRASŠIPO POTEŬKIN  
(Sovetunio, 1925) de  
Sergej Eisenstein. Unu el  
la plej fruaj klasikaĵoj.

laŭgrade ĝi disvolvis lingvon kaj estetikon proprajn. Kulmino de kinematika histori-rakontado estis esplorata en 1915, kun *La naskiĝo de nacio* (*The Birth of a Nation*) de la granda usona reĝisoro D. W. Griffith, monumenta demonstro de la teknikaj kaj stilistikaj ebloj de la nova arto-formo (kvankam kun sia rasisma pentrado de la Usona Civila Milito, ĝi ankaŭ montris la debatablan potencialon de la nova medio).

En la 1920-aj kino disvolviĝis en relativa izoliteco de la aliaj artoj. Dum Marcel Proust kaj T. S. Eliot revoluciis la literaturon, Picasso, Kandinsky kaj Duchamp montris novajn vojojn por la pentrado, kaj Stravinsky, Schönberg kaj Bartok eksplodigis la tonalan sistemon de klasika muziko, kino precipe provadis establi teknikojn de logika rakontado bazitajn sur la romanoj de Dickens kaj popolaj fikcio kaj melodramo de la 19-a jarcento.



Avangarda kino ja tamen ekzistis en la 1920-aj. Francaj eksperimentoj kun surrealismo kaj dadaismo, germana ekspresionismo kaj la rusa munto-stilo estis esplorprovoj de novaj aliroj al kino kiel arto. Filmoj kiel *Andaluza hundo* (*Un chien andalou*), *Kabineto de d-ro Caligari* (*The Cabinet of Dr. Caligari*) kaj *Kirasŝipo Potemkin* de Sergej Eisenstein estas konsiderataj mejloŝtonoj de kino kaj larĝe admirataj pro sia originaleco. Sed ili havis malgrandan influon sur la ĉeffluon de filmoj.

Intertempe Holivudo estis konstruanta enorman distro-industrion, kaj spite al la gravaj eŭropaj kontraŭkurentoj (kiel la franca poezia realismo en la 1930-aj kaj la itala novrealismo en la 1940-aj), ĝi baldaŭ gajnis tutmondan regon. La periodo de la 1930-aj ĝis la 1950-aj estis la erao de la klasikaj hollywoodaj rakontoj, kun la "stelul-sistemo" kaj la "studio-sistemo" kiel ĉefaj kolonoj de la revo-fabriko.



Reklamafiŝo por *HISTORIO DE LA BANDO KELLY* (Aŭstralio, 1906). Laŭ diversaj kriterioj, la unua plenlonga fikcia filmo de la historio.

*LIMO* (Brazilo, 1930) de Mario Peixoto estas konsiderata la plej klasika latinamerika filmo.

Peter Schepelern estas profesoro en la Departamento de Filmo kaj Reklamado en la Universitato de Kopenhago. Li verkis librojn pri film-teorio kaj -historio kaj recenzis filmojn por diversaj gazetoj.





**CIVITANO KANE (Usono, 1940) de Orson Welles, kun li en la ĉefa rolo, estas por multaj la plej bona filmo iam ajn farita.**

### DEFIANTE LA SISTEMON

Kino, pli ol iu ajn alia arta perilo, dependas de akcepto kaj mono de la ekonomia sistemo, tial ke la produktokostoj de filmo estas tiom multe pli altaj ol tiuj de libro, pentraĵo aŭ muzikaĵo. Sekve la "sistemo" ĉiam havas pli da influo super la kino ol super la aliaj artoj. La historio de kino registras kontinuan streĉitecon inter la inerteco de la sistemo akcelata por serĉi facilan monon, kaj filmfaristoj serĉantaj kontentigi sian artan ambicion. Ekzistas kino kiel arto, kreita de individuemaj geniuloj, kiuj donkiĥoteske defiis la sistemon, kaj estas kino je la servo de superregantaj ideoj kaj valoroj.




**RAŜOMON (Japanio, 1950) de Akira Kurosawa – la plej granda azia kinreĝisoro.**

**PERDANTE LA SPIRON (Francio, 1959) de Jean-Luc Godard.**



**LEVU LA RUĜAN LANTERNON (Ĉinio, 1991) de Zhang Yimou. Post Vivodaŭroj (1994) la ĉina registaro malpermesis al li filmi aŭ eliri el la lando.**

**NEĜULINO KAJ LA SEP NANOJ de Walt Disney (Usono, 1937) estis la unua plenlonga animita filmo de la historio. 750 artistoj laboris 3 jarojn perfektigante 250 000 el proks. 1 miliono da bildoj.**



**Filmado ĉe la Naciaj Film-Studioj en Ranguno, Birmo.**

**Modelo de la novaj studioj Babelsberg (Germanio) konstruotaj en la 1990-aj. Tiuj ĉi studioj produktis multajn klasikojn, kiel LA BLUA ANĜELO (1929-30) de Josef von Sternberg, kun Marlene Dietrich.**



La populareco kaj fascino de filmoj estis kaj estas uzitaj por arto kaj distro, sed trouzitataj por manipulado kaj falsado. Lenin nomis la kinon "la plej grava el la artoj" (1922), kaj dum la 1930-aj filmarto iĝis politika propagandilo en la manoj de la totalismaj reĝimoj – stalinisma Rusio, nazia Germanio, faŝismaj Italio kaj Hispanio. *Triumfo de la volo* de Leni Riefenstahl sola, spite al sia naŭza diigo de Hitlero, elstaras kiel originala artoverko. Holivudo respondis per filmoj glorantaj la demokratiajn landojn, iliajn valorojn, ilian kuraĝon kaj rezistemon.

### NOVAJ ONDOJ KAJ KOMPLIKAĴOJ

La unua decida trarompo farita de kino en la establita kulturo venis post la Dua Mondmilito, kiam nova generacio de filmfaristoj donis formon kaj senton al la postmilita sperto, eble pli efike ol faris iliaj kolegoj en la pli malnovaj artoj. *Biciklo-ŝtelistoj (Ladri di biciclette)* de Vittorio De Sica; *La vojo (La strada)* de Federico Fellini; *Raŝomon* de Akira Kurosawa; *Sovaĝaj fragoj (Smultronstället)* de Ingmar Bergman; *Cindro kaj diamanto (Popiel i diament)* de Andrej Wajda,





**LA FAJR-BRIGADISTA BALO** (Ĉeĥo-slovakio, 1967), de la nun tutmonde fama Miloš Forman.



**2001: SPACODISEO** de Stanley Kubrick (Britio, 1968) staras pinte en la sciencfikcia kino.



**E.T. LA EKSTERTERANO** de Steven Spielberg (Usono, 1982).



**SENDORME** (Egiptio, 1957) de Salah Abou Seif montris la estontan holivudstelulon Omar Sharif.



**LA LADA TAMBURO** de Volker Schlöndorff (1979) redonis al FR Germanio indan lokon en la postmilita kinomondo.



**LA OFICIALA HISTORIO** de Luis Puenzo donis Oskaron al Argentino, kiu kun Meksiko kaj Brazilo havas longan kintradicion.

estis verkoj, kiuj markis novan modernismon. Diference de la pli fruaj avangardaĵoj, tamen, ili estis vaste vidataj de ĝenerala publiko. La kino fine akceptiĝis kiel arta perilo.

Grandaj filmoj, kontraŭe al aliaj artoformoj, ofte transcendis la kutimajn distingojn inter malalta kaj alta kulturo. Virtuozaj holivudaĵoj, kiel la erotikaj komedioj de Ernst Lubitsch, la *vesternoj* de John Ford, la melodramoj de Max Ophuls kaj la tremfilmoj de Alfred Hitchcock ne enhavas literaturajn profundaĵojn; sed rigardataj kiel vidarto, kiel ekzemploj de bilda rakontado, ili establis tute novan koncepton de la filma kulturo. Malvolonte la bastionoj de la alta kulturo devis konstati, ke filmo kiel perilo havas sian propran valoron. □

(Esperantigita el *THE UNESCO COURIER*, jul.-aŭg. 1995)



**La aserto de Mussolini, ke "Kino estas la plej forta armilo" regas dum la inaŭguro de la famegaj studioj Cinecittà en 1937.**



**SUB LA OLIVARBOJ** (Irano, 1987) de Abbas Kiarostami. En Irano usonaj filmoj estas malpermesitaj en kinejoj.



**ELEKTO** (Burkina Faso, 1986) de Idrissa Ouedraogo.



**LA DOLĈA VIVO** (Italio, 1960) de Federico Fellini.

**GENEZO** (Hindio, 1986) de Mrinal Sen. Hindio produktas pli da filmoj ol iu ajn alia lando.

kaj la trilogio *Apu* de Satyajit Ray plu iris en direkto de serĉado por humanismo en erao de dubo kaj skuiĝantaj konvinkoj. Tiu ĉi estis kino de granda drameco kaj alta artisma valoro, sed ankoraŭ larĝe konvencia kaj bazita sur la premisoj de literatura kulturo.

En la 1960-aj la filmoarto enrampis en novan grundon, sed restis en la populara ĉeĥflujo. La filmoj de la franca Nova Ondo de la humanisto François Truffaut, la mizantropa Claude Chabrol kaj la radikala Jean-Luc Godard, kaj filmoj kiel *La aventuro* (*L'Avventura*) de Michelangelo Antonioni, *8 1/2* de Federico Fellini, *Lastan Jaron en Marienbad* (*L'Année dernière à Marienbad*) de Alain Resnais kaj *Persona* de Ingmar Bergman



*Al la amantoj de kino ni rekomendas jenajn verkojn:* **EN LA MIRINDA MONDO DE LA KINO.** Donĉo Ĥitrov. Budapeŝto, 1985. 212 p. 16x22 cm. Ilustr. Rakonto pri la farado de filmo. 7,50 gld. **EN EŬROPO IE.** Reĝ. Gèza Radványi, Béla Balázs. Budapeŝto, 1987. VHS-PAL. 80-minuta. Klasika post-milita filmo dublita en E-on. 60,00 gld. **KINARTO KAJ NI.** Red. Giorgio Silfer k.a. LF-koop, 1990. VHS-PAL. 40-minuta. Antologio pri Esperanto en kino. 67,80 gld. **MEFISTO.** Reĝ. István Szabó. Budapeŝto, 1988. Oskar-premiita filmo dublita en E-on. 99,00 gld. Mendu tuj ĉe UEA!



## La baleno de Juan Carlos

Juan Carlos Valdivia [huan' karlos valdivja] (33-jara) estas nova kinreĝisoro, kiu en la jaro de la centjariĝo de kino debutas per sia unua plenlonga filmo: *Jona kaj la rozkolora baleno* (*Jonás y la ballena rosada*). **KONTAKTO** intervjuis lin dum Latinamerika Film- kaj Literatur-Festivalo en Roterdamo, ĉi-oktobre.

*Kiel vi alvenis al la kinomondo?*

Mi studis kinon en Ĉikago dum 4 jaroj, de 1984 ĝis 1987, post kio mi laboris pri reklamfilmetoj kiel muntisto, kaj de tie iris al Los-Anĝeleso, kie mi teatris aktorante kaj reĝisorante, kaj verkis. Tie mi klopodis eniri la kinomondon, sed tio montriĝis tre malfacila.

*Ĉu tial vi revenis al Latinameriko?*

... Eble pli pro nostalgio, deziro reveni al mia lando. Mi vivis en Usono 13 jarojn, sed revenis al Bolivio kaj faris filmon. Tie mi havis grandan bonŝancon, la popolo tre apogis min. Ankaŭ mian venontan filmon, streĉ-filmon ĉi-foje, mi faros en Bolivio.

*Mi aŭdis, ke ĉi-jare premieris kvin boliviaj filmoj – ĉu vere?*

Tio estas tre stranga fenomeno, kvankam Bolivio ĵa havas kin-tradicion – multe pli malgrandan, evidente, ol aliaj latinamerikaj landoj – sed ni tamen havas gravajn, rekonatajn reĝisorojn, kiel Jorge Sanginés [horĥe sanĥines']. Mi kredas, ke la financa situacio de Bolivio pliboniĝas. Kino ekzistas tie, kie estas mono – kostas multege fari filmon. *Jona...* sola kostis unu milionon da dolaroj. Tion ebligis privataj entreprenoj kaj ankaŭ la bolivia registaro multe apogis. La produktistoj okupiĝas pri ĵurnalismo kaj tio estas bona rimedo, tra kiu povas veni investoj. Do ili mem alvokis konatojn, amikojn, partnerojn, kiuj kontribuis. Kaj, ĉar temis pri kunproduktaĵo kun Meksiko, ankaŭ de tie venis mono – kaj ne nur mono: kvar el la ĉefroluloj kaj multaj el la teknikistoj estas meksikaj,

**Siavice, la reĝisoro multe enketis pri Esperanto.**



kaj en ilia lando ni faris la postproduktaĵon. Mi mem vivas en Meksiko, tie estas la "bazo", kien mi ĉiam revenas.

*Kiel vi ekkontaktiĝis kun Jona kaj la rozkolora baleno?*

Mi legis la libron, de la bolivia aŭtoro José Wolfango Montes Vanucci, tuj post ĝia apero. Mi tre ŝatis ĝin kaj, kiam mi komencis konsideri reveni al mia lando, mi elektis tiun romanon kaj eklaboris pri la skripto. Kaj efektive, reveninte al Bolivio, mi filmis ĝin.

*Kiel estas farita la sceno kun la piramido?*

Temas pri kina truko tre simpla, konata kiel *glass-shot* [glas-ŝat] en la angla, aŭ *printed glass* [printd glas]. La koncerna objekto, piramido en tiu ĉi kazo, estas pentrita sur vitro. Ĝin oni metas unu metron for de la kamerao, dum la aktoroj estas malantaŭ la vitro. La komponita bildo tamen ŝajnigas, ke la piramido estas malantaŭ ĉio. Kompreneble, necesas desegni, pentri kaj lumigi la objekton tre zorge, do tiurilate ne estas facile. Sed la principo jes ja estas. Tiel oni faras jam ekde la silenta epoko.

*Via filmo tre imponis pro la egipteco. Ĉu tio estis en la origina romano aŭ estis revo via?*

Tio estas en la libro kaj ĝuste estis unu el la temoj, kiujn mi plej ŝatis, sekve mi disvolvis ĝin. Nome la frenezajo de ulo, kiu venas al la ideo konstruigi egiptan piramidon en la bolivia dezerto... En Latinameriko ni havas multajn tiajn specimenojn, iom frenezajn...

— Intervjuis kaj fotis Francjo Veuthey

## Kristnasko



### Kun religio revenis ankaŭ Kristnasko al Rusio. Sed... ĉu iam revenos la malnovaj rusaj kristnaskaj kutimoj?

**K**ristnasko! Antaŭe mi (kaj multaj aliaj samaĝuloj) eĉ ne sciis, ke tiu ĉi estas gravega festo. Oni edukis nin por festi nur la 1-an de januaro kaj eventuale la 14-an de januaro kiel malhovcan Novan Jaron. Sed post perestrojko\*, religio\* denove eniris la rusan vivon – kvankam Paskon ni ĉiam memoris. Kristnasko do fariĝis "nova" ŝtata festo. En Rusio ĝi okazas la 7-an de januaro.

Antaŭe Krisnaskon oni tre atendis ne nur pro tio, ke tiam la familio povis agrable kunveni hejme, sed ĉefe pro tio, ke ĉirkaŭ tiu tago oni povis sen timo pri onidiroj antaŭdiri la estontan vivon.

Oni opiniis, ke la periodo de la 25-a de decembro ĝis la 7-a de januaro posedas\* la nekutiman econ favori\* antaŭdirojn. Certe plej ofte oni antaŭdiris al fraŭlaj junulinoj, kvankam jen kaj jen ankaŭ la junuloj provis antaŭscii. Kelkajn el tiuj malnovaj metodoj por antaŭdiri mi volus priskribi.

Kutime la junulinoj kolektiĝis en ies hejmo. Necesis meti sur la planko panon, akvon, karbon, oran, arĝentan kaj kupran\* ringojn\* kaj, laŭdezire, kelkajn aliajn aĵojn. Oni alportis kaj enlasis kokon\* aŭ kokinon. Ĉiu junulino proponis al la birdo iun el tiuj aĵoj. Oni opiniis, ke se la birdo trinkas akvon, la estonta edzo estos drink\*-emulo; se ĝi manĝetas panon, la edzo estos inda homo; se ĝi prenas karbon, la edzo estos malriĉulo. Se ĝi elektas la oran ringon, la edzo estos riĉega; se la arĝentan, la edzo estos riĉeta; kaj se la kupran, la edzo estos malriĉa. Ĉiam la junulinon tre interesis, kian edzon ŝi havos estonte.



### FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO! fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikajojn.

### IĜU ĴURNALISTO PER ESPERANTO!

**Nun eblas, per la koresponda kurso de TEĴA\* por trejnado de ĵurnalistoj, lerni metodojn kaj praktikojn komforte hejme laŭ propra impeto!**



**Plenigu kaj sendu la suban kuponon al:**

\*TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO,  
ĉe d-ro Paul Gubbins,  
3 Arden Court,  
Mosley, Congleton,  
Cheshire CW12 3JH,  
Britio.


Petu provekzempleron  
de la faka revuo  
INTERNACIA ĴURNALISTO

Bonvolu sendi al mi informojn pri la PERKORRESPONDA KURSO de  
TEĴA por TREJNADO DE ĴURNALISTOJ.

Nomo \_\_\_\_\_  
Adreso \_\_\_\_\_

en

facila



# malnova Rusio

— Irina Aleksejeva, Rusio

La plej ofta antaŭdir-maniero en vilaĝoj okazis pere de ŝuo. Junulino kutime ĵetis sian maldekstran ŝuon trans la pordegon. Se la ŝu-pinto\* montris al la domo, tre verŝajne en tiu sama jaro ŝi edziniĝos. Se ĝi restis orientita al la kontraŭo de la domo, tiam ŝi ankoraŭ restos hejme kun siaj gepatroj tiun jaron.

Ekzistis ankaŭ tre simpla metodo de antaŭdiro per sankta libro. Oni prenis iun ajn libron de religia enhavo. La junulino devis ekpensi demandon. Poste ŝi diris du numerojn. Tiam oni devis serĉi laŭ la unua numero paĝon kaj laŭ la dua linion, kies vortoj donis la respondon.

Tiel amuziĝis niaj antaŭuloj. Bedaŭrinde ni forgesis multajn kutimojn, inter kiuj estis tiuj ĉi, de la kristnaskaj antaŭdiroj. Kelkajn el ili A. S. Puŝkin preparoletas en sia famega verko "Eŭgeno Onegin", kiam al la ĉefa persono de la verko, Tatiana Lárina, kristnaske oni antaŭdiras pri fianĉo.

Vi rajtas nei ĉiujn antaŭdiraĵojn, konsideri ilin stultaj. Sed vi ne povas nei, ke la homo ĉiam volis scii, kio fariĝos el lia estonto.


Provu. Povas esti, ke vi ekscios ion... Sed por tio necesas atendi ĝis Kristnasko. □

**argenta:** brila blanka metal-koloro  
**drinki:** plezurigi en la trinkado de fortaj trinkaĵoj, ekz-e vino.  
**favori:** agi konsente al iu prefere al aliaj  
**koko:** birda, natura "vektorloĝo"  
**kupra:** bruneruĝa metalo tre uzata ekz-e por elektraĵoj

**perestrojko:** ĝi "kulpas" por la ŝanĝoj en Rusio  
**pinto:** plej alta/antaŭa parto de io  
**posedi:** havi  
**religio:** sistemo de kredo al io, kio regas ĉion  
**ringo:** rondo kun ronda truo, ofte metala, por uzi ĉirkaŭ la fingro

## ATENTON, MALFORTVIDANTOJ!

Vi povas senpage ricevi **KONTAKTO** voĉlegitan. Necesas nur sendi du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.



## Ĉu **KONTAKTO** plaĉas al vi?

Se jes, ne kontentiĝu legi la ekzempleron de via klubo aŭ instruisto – abonu ĝin mem! Se vi estas kursvidanto, faru kolektivan abonon kun 20% rabato por via lernantaro (sufiĉas nur 6 ricevantoj). Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu adreso, la rabato estas 40%! Kaj, se temas pri grandaj grupoj, ni povas interkonsenti eĉ pri pli favoraj rabatoj! Skribu al ni!

### ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 lirej	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

## PROVU VIAN SCION PRI EKSTERTERAJ LINGVOJ EN KINO!

— Claus Güntel, Germanio

En filmoj oni foje parolas lingvon, kiu ne ekzistas sur nia Tero. Eksterteranoj aŭ aliepokanoj eldiras strangajn frazojn kaj fremdajn vortojn. Ĉi-sube estas tri frazoj el tri usonaj filmoj fikciaj. Via tasko estas malkovri el kiuj konataj filmoj (ĉi-dekstre) ili venas. Sendu vian rezulton al nia redakcio antaŭ la 31-a de januaro 1996. Inter ĉiuj partoprenantoj ni lotumos ekzempleron de la 210-paĝa libro *En la mirinda mondo de kino*.



### Filmoj:

1. El *La tago, kiam la Tero staris senmove* (*The Day the Earth Stood Still*) de 1951. Klaatu estas la nomo de eksterterano. Bezonante helpojn li diras la frazon al amika virino, por ke ŝi diru ĝin al lia roboto. Tre verŝajne la frazo signifas: "Klaatu bezonas helpojn."
2. El *Stelvojaĝo 6* (*Star Trek VI: La nemalkovrita lando*) (*The Undiscovered Country*). La frazon diras klingono dum la kosmoŝipa vespermanĝo. Ĝi signifas: "Esti aŭ ne esti."
3. El *Ekskaliburo* (*Excalibur*). Temas pri magia formulo.

### Eldiraĵoj:

1. *Taĥ pa taĥ pe.*
2. *Klaatu barada nikto.*
3. *Anal natraĥ*  
*Ut vas betat*  
*Do jel dĥen ve.*

## anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

**25-jara edzino** deziras korespondi kun gee-istoj el Aŭstralio, Danio, Germanio, Nederlando, Svislando kaj Usono i.a. pri rasaj hundoj. Oksana Maslovskaja, a/k 65, UA-262003 Ĵitomiro-3, Ukrainio.

**KVAR TEATRAĴOJ** estas grandformata, kolore ilustrita libro originale verkita de usona profesia aktorino. Plejparto de la verkoj en la libro ricevis literaturajn premiojn. Mendu la 148-paĝan libron kontraŭ USD 15,00 (inkluzive sendokostojn) de: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono. UEA-konto: elna-w.

**23-jara studento** deziras korespondi tutmonde. Afshin Rasulian 14, Homayun Lane, Sh. Rajayi Str. Bahar Square, IR-69156 Borujerd, Irano.

**14-jarulo**, kies hobbio estas interlingvistiko kun konoj de angla, franca, germana, hispana kaj portugala deziras korespondi kun kolegoj en Brazilo, Portugalio kaj Eŭropo ĝenerale. Piotr Szymeczko, ul. Wł. Łokietka 6/12, PL-30-010 Kraków, Pollando.


**39-jara fraŭlo** deziras korespondi i.a. kun nederlandanoj. Skribu al: Kalju Junts, Pääne Maakond, Ridala skj. Parila, EE-3181, Estonio.

mozajko

n-ro 149 (1995:5)

KONTAKTO





# Kaŝa Niĝerio

— Ŝhó-Davies Olúwábùnmi, Niĝerio

**Framasonismo iĝas pli kaj pli minaca en la eduka vivo de Niĝerio. Eĉ homaj vivoj perdiĝas pro la fiagado de loĝoj.**



**E**stas homece kaj nature, ke en ĉiu socio kelkaj uloj revegas superi la aliajn. Kutime ili iel iĝas riĉaj kaj/aŭ potencaj. Pro ilia potenco komenciĝas socia malsameco. Ili opinias, ke kion ili faras, tion ordinariuloj ne faru. Kelkaj eĉ aliĝas al sekretaj societoj. Neniu povas prirakonti ĉion, kio okazas en la sekretaj societoj, escepte de la membroj mem.

Laŭ la onidiroj, origine la kaŝaj societoj establiĝis ne por malbonaj agadoj, ĉar tiam (kaj ankaŭ nun) aliĝis (-as) la reĝoj kaj iliaj ĉefaj subuloj; kaj, ankaŭ, oni ne povis aliĝi ĝis la plenkreskeco. Tiuj societoj ne nur rilatas al la kron-ceremonio, sed ankaŭ konsilas la reĝon. Ili ankaŭ havas la potencon malkroni reĝon, kiu ofendas iamaniere. Pro tio, ke la ĉefoj de la kaŝaj societoj ankaŭ estas la ĉefoj de la urbo, oni opinias neeble, ke gravuloj kaŭzu malbonon.

Antaŭ proksimume 150 jaroj kristanismo eniris Niĝerion, akompanata de eduko kaj aliaj modernaĵoj. Kristanismo kaj islamo, la du ĉefaj fremdaj religioj en nuntempa Niĝerio, kontraŭbatalis kaj venkis multajn praaĵojn, kiel prihoman komercon. Tiuj fremdaj religioj pli kaj pli opinias, ke tiel granda malsameco inter homoj estas malpia. Tamen, la grandaj religioj ne sukcesas venki la sekretecon de tiuj ĉi societoj.

Lu anglikana pastro en Niĝerio asertis iam en la 1930-aj jaroj, ke ĉar sekretaj societoj ekzistas ankaŭ alilande, kiel en Anglio, Francio kaj Jamajko, ne estas prave aserti, ke la niaj estas tute malbonaj. Li opiniis, ke anstataŭ plene forigi la societojn, oni iom ŝanĝu iliajn principojn tiel, ke ankaŭ kristanoj povu aliĝi. Li sugestis, ke oni ĉesigu ĉiujn malpiajn agadojn kaj ekpreĝu nome de Jesuo

Kristo. La bildo estu blanka kalabaso en kiu troviĝas ekzemplero de la Biblio anstataŭ aĉaj metalaĵoj, sur kiujn oni tiam verŝis kolaon, salon, oleon ktp. Jen kial en multaj kaŝaj societoj en Niĝerio oni uzas la Biblion kaj preĝas nome de Jesuo... krom aliaj praktikoj.

Multaj aliaj anglikanaj pastroj kontraŭis la sugestojn de tiu ĉi pastro dirante, ke estas sakrilegie elvoki la nomon de Jesuo kie oni faras oferon al idolo. La pastro tamen sukcesis per sia deziro kaŝ-anigi kelkajn kristanojn, kion nepre sekvis, ke gravuloj pli kaj pli ekaniĝis.

Nuntempe en Niĝerio ekzistas multaj sekretaj societoj. Oni diras, ke estas avantaĝe esti membro, ĉar pro religiaj interkonsentoj, neniu malbonfaras kontraŭ la alia(j). Ili do helpas unu la alian eĉ en la sekulara socio. Same kiel esperantisto libere helpas fremdan samideanon, ankaŭ membro ĉe iu loko helpas membron de kaŝa societo de alia loko; sufiĉas pruvmontri per mansigno aŭ kaŝa diraĵo, ke oni estas membro.

## Kiel tio atingis la universitaton?

Estas logike diri, ke la universitataj kaŝsocietoj devenas el la antikvaj sekretaj societoj. Oni povus redemandi, ke se ili ja devenas de tiuj, kial do iliaj societanoj faras krimojn kiaj hommortigo, rabo kaj aliaj? Miaopinie, la membroj de la malnovaj kultoj bastardigis sian helpe-

## BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1996

La Belartaj Konkursoj de UEA ricevas ĉi-foje ekstran fascinon pro la urbo kie oni kronos la laŭreatojn: Prago, unu el la historiaj metropoloj de literaturo kaj aliaj artoj. Plian fascinon donas la nekutima grandeco kiun oni antaŭvidas por la Praga Universala Kongreso. Ankaŭ la kongresa temo ligiĝas al Kulturo: "Kulturo — valoro aŭ varo?"

Ĉu en tiaj kadroj la Belartaj Konkursoj spertos en 1996 unu el siaj plej fekundaj jaroj? Tion esperas la organizantoj, kiuj denove invitas kreemajn esperantistojn al partopreno en la plej prestiĝa kaj vivipova belarta institucio de Esperanto.

Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj en presa aŭ alia formo. Krome validas jenaj kondiĉoj:

**Poezio:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

**Prozo:** Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

**Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

**Eseo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 81-a UK: "Kulturo — valoro aŭ varo?". Tri premioj, el kiuj la unua nomiĝas "Luigi Minnaja".

**Kanto:** Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Eblas sendi la melodiojn surpapere aŭ sonbende. Tri premioj, el kiuj la unua nomiĝas "An-Song-san".

**Vidbendo:** Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

**Infanlibro de la Jaro:** Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1995. Unu premio.

**Sendo:** Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1996. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1996. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

**Premioj:** Unua premio: 390 gld. Dua premio: 273 gld. Tria premio: 156 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita): 273 gld. Infanlibro: 819 gld.

**Publikigo:** La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.

**Detala regularo** haveblas kontraŭ unu respondkuponon.

# Tribaj nomoj de Akano

— Yaw Ampomah Badu Frempong, Ganao

Akano estas la plej granda tribo\* en Ganao. Sed ĝi havas pli malgrandajn erojn, kiuj estas Asante\*\*, Kwahu, Akuapem, Akin kaj Fante. Ĉi tiuj grupoj parolas saman lingvon, *twi* [ĉii] aŭ *fante* [fanti], kiun ĉie tra Ganao oni parolas. Akananoj formas sesdek elcentojn de la ganaa popolo.

Akananoj kredas je la ekzisto de Dio, supernaturaĵoj, aperiaĵoj de mortaj homoj, ktp. Krome ili kredas je la protekto de aliaj estaĵoj, kiaj la maro, montoj, riveroj, arboj, kiuj havas bonan econ. Akananoj kredas, ke ankaŭ la prapatroj, kiuj vivas ĉie, zorgas pri ili.

Ĉiu akanido havas tri aŭ kvar nomojn. La unua estas la naskiĝtaga nomo. La dua estas la naskiĝ-pozicia\* nomo. La nomo de patroflanka avo aŭ inda persono en la familio — tiu, kiun oni admiras, estas la tria nomo kaj la kvara nomo estas okaznomo. Ĝin oni donas, kiam la infano naskiĝas dum iu okazaĵo, ekzemple dum festo aŭ eĉ dum iu malplaĉa situacio.

**admiri:** sperti altan senton pro la bonaj ecoj de iu  
**avo:** patro de patro aŭ patrino  
**pozicio:** loko  
**protekti:** zorgi de malbono

**tribo:** popolo; parto de la homaro  
**vizaĝo:** antaŭa parto de la homa kapo (*kapo*= plej supra parto de homo)

tre  
facila

Mi havas kvar nomojn. Mi nomiĝas Yaw Ampomah Badu Frempong [jaŭ ampoma' bedu' frimpon']. Yaw estas mia tagnomo, ĉar mi nomiĝas laŭ ĵaŭdo. Ampomah estas mia avonomo. Badu estas mia pozicia nomo, ĉar "ba" signifas idon kaj "du" signifas dek, do Badu signifas, ke mi estas la deka infano. Frempong tamen ne estas okaznomo, sed simple mia familinomo.

Multaj akananoj havas ĉi tiajn nomojn, sed aliaj, kiuj loĝas en urbegoj, jam portas eŭropajn nomojn. Krome, ĉiu akanido devas havi markon sur la vizaĝo.

Jenaj nomoj estas naskiĝtagaj nomoj de la triboj Akano kaj Fante (apude por tiuj ĉi lastaj, kiam ili malsimilas de la akanaj)

	Masklaj	Inaj
<b>dimanĉo</b>	Akwasi (Kwasi)	Asi (Esi)
<b>lundo</b>	Kwadwo (Kojo)	Adwoa
<b>mardo</b>	Kwabina	Abena (Araba)
<b>merkredo</b>	Kwaku	Akua (Ekua)
<b>ĵaŭdo</b>	Yaw (Yao)	Yaa (Aba)
<b>vendredo</b>	Kofi (Feefi)	Afua (Efua)
<b>sabato</b>	Kwame	Ama

Ĉu ankaŭ tiu ĉi ganaa knabino portas akanajn nomojn?

.....  
\*\*Plej forta estas la lasta vort-ero. Jen helpilo pri la elparolo de nomoj:  
**dw**= ĝ    **kw**= ĥ  
**ee**= i    **tw**= ĉ



ATILIO ORELLANA ROSAS

mecon unu al la alia. Viva ekzemplo: pro emo helpi anon de sia sekreta societo, juĝisto deklaras ŝteliston senkulpa.

Antaŭe la komuna nomo por tiaj societoj en la joruba lingvo estis *Ōgbóni*, kiu ŝanĝiĝis poste al "loĝio" aŭ "framasono", nomo entute fremda al ni. Pri la ŝanĝo de la nomo kaj agado de *Ōgbóni* kunlaboris ankaŭ fremduloj, kiuj fakte diris, ke framasonoj ilialande predikas fratecon, helpemon ktp.

En niĝeriaj universitatoj hodiaŭ tiuj grupoj nomiĝas diverse, kiel *Nigras ratoj*, *Nigras katoj*, *Piratoj* kaj aliaj — ĉiuj teruraj nomoj. Onidire iliaj iniciatintoj, nuntempaj gravuloj en Niĝerio, fondis ilin por helpi la studentojn akiri helpon diversmaniere — sed tiu origina celo perdiĝis.

En la universitatoj, serĉegante konsolon por siaj akademaj aŭ emociaj problemoj, la studentoj finfine aliĝas al, ekzemple, *Nigras katoj*. Aliaj aliĝas pro volo esti konataj kaj respektataj. Plejparto de la riĉulidoj estas membroj konsciante, ke neniu povos riproĉi ilin. Estas ja neverŝajne, en niaj universitatoj, ke lekciisto aŭ studenta administranto, kiu ne posedas aŭton, riproĉus studenton, kiu ja havas ĝin: Li ja ne dezirus perdi la ŝancon reveni al sia loĝejo per la aŭto de sia studento. Aŭ eĉ pli: li certe ne dezirus perdi la ŝancon labori en la laborejo de lia patro! Precipe nun, kiam instruado estas unu el la plej subpagataj laboroj en Niĝerio.

## La rekrutado

Por rekruti novajn membrojn, oni metas informojn sur la anonctabulon pri la deziro aligi interesitojn al la grupo. Studentoj kelkfoje logiĝas pro la falsa diro, ke temas pri batalo kontraŭ studenta subpremo, koloniismo ktp de la universitata kaj registara aŭtoritatoj. Tiuj, kiuj deziras aliĝi, kunvenas kun la estraranoj de la grupaĉo. Inicotoj estas devigataj fari perfortajn antaŭnicajn farojn por montri, kiu povos elteni suferon. Inicito inkluzivas la uzadon de propra sango por skribi sian nomon en certan lokon. Ĉiu inicito devontiĝas trinki la sangon de la aliaj, kun la solena promeso ne malkaŝi la sekreton de la grupo al iu ajn ne-inicito.

Antaŭnelonge oni rimarkis kun mirego, ke kaŝsocietoj ekzistas ne nur en universitataj medioj kaj aliaj triagradaj lernejoj, sed ankaŭ en kelkaj elementaj kaj eĉ antaŭelementaj lernejoj! Onidire, la inicito de infanoj faciligas la aktivadon.

## La solvo

Kial do oni povos forigi tiujn ĉi grupaĉojn de niaj lernejoj? Estas malfacilege, ĉar gravuloj anas en ili. Ne mirinde do, ke en 1994, kiam mi ankoraŭ studis, arestiĝis kelkaj membroj, kiujn oni bategis preskaŭ ĝismorte. Nun la denunciataj studentoj, el la tiel nomata kontraŭkulta grupo, ektimis pro la sekvo de ilia liberigo. Ili do forkuris de la universitato.

Tamen, solvoj ekzistas.

Se la registaro ĉesigos la buŝnivelan minacon kontraŭbatali la grupojn kaj efektive ekagos, ekzemple punante la financulojn (i.a. politikistoj, kiuj deziras gajni favoron inter la studentaro dum elektoj). La registaro ankaŭ punu kaj eksigu lekciistojn kaj lernejestrojn, kiuj per sia aliĝo al tiuj grupaĉoj kuraĝigas la studentojn aliĝi.

Universitatoj kaj aliaj firme ekstaru. Fakte jam de multaj jaroj la edukado suferas en Niĝerio. Instruistoj ricevas malaltan salajron, tiel ke oni prenas tiun laboron nur kiam ne haveblas alia. Kelkfoje la instruistoj strikas multmonate, tiel ke la studentoj, laĉaj pro daŭra malaktivado, venĝas kontraŭ ili aŭ kontraŭ la registaro, kiu restas indiferenta.

La registaro helpu finance akiri edukmateriaĵon tiel ke la studento ne plu spertu "edukon kun ploro", kiu kaŭzas emociajn problemojn multfoje kondukantajn al aliĝo en la societoj. La administrantoj pri studentaj aferoj estu bone pagataj, ĉar interalie ankaŭ ili montras indiferenton. Sufiĉajn gastejojn la registaro konstruu por ke la studentoj loĝu ne ekster la lernejo — la agaĉoj planiĝas ekstere.

Ĉe ni oni diras, ke "tra la flamo oni sendas mesaĝon al la fajro". Kontraŭkulta Grupo Studenta ankaŭ estus helpa ĉar eĉ pli ol la policanoj kaj aliaj juraj agentoj, tiu ĉi grupo (kune kun la Asocio de Gepatroj kaj Instruistoj) povus malkaŝi la membrojn de la grupaĉoj. □



# La ĝisostulo.

facila

— Ulrich Matthias, Germanio

Estis en la lasta nokto de la IJK. Bernard jam dum duona horo agrable interparolis kun Anja. Subite la juna franco ekhavis la ideon, ke la fakto, ke ŝi ne simple foriris jam post kelkminuta konversacio, povus signifi ion. Kaj tuj li sentis internan ĝojon, eĉ se ĝin ankoraŭ sub-premis sento de malcerteco. Nun li eĉ pli atenteme aŭskultis la ĉarman\* voĉon de Anja; li pli atente rigardis la liniojn de ŝia vizaĝo, la buklojn\* de ŝia hararo. Li tiom ŝatus karesi\* ŝin!

“Ĉu ni sidiĝu?”, demandis Bernard, kaj Anja jesis, rigardante lin fikse en la okulojn, kvazaŭ ŝi volis diri: “Finfine vi komprenis!” Ili sidiĝis ĉe proksima tablo. Bernard proponis alporti por ŝi ion por trinki, kaj mallonge poste li iom rapide revenis de la vendotablo kun du glasoj da ruĝa vino, el kiuj li donis unu al Anja. La dankemo kaj ĝojo, kun kiuj Anja akceptis la glason, ne plu lasis ian dubon ĉe Bernard: Estis klare, ke ankaŭ ŝi enamiĝis. Li prenis la dekstran manon de Anja kaj karesis ŝin. “Mi ege ŝatus vin”, li diris dum tio, kaj Anja sin klinis al li kaj kisis lin sur la buŝon. Estis longa, tre profunda kiso. Dum duona horo ili plu sidis tie kisante kaj ĉirkaŭbrakante unu la alian preskaŭ sen-vorte.


“Mi tute ne supozis, ke vi ne havus amanton”, diris Bernard finfine.

“Fakte, ĝuste pro tio mi venis al la IJK”, respondis Anja, “antaŭ kvar semajnoj finiĝis mia rilato kun Frank. Li estis neesperantisto.”

“Interese. Tamen, vi estas tiom altira, ke vi tre facile trovus novan koramikon ankaŭ en via hejmurbo...”

“Jes. Sed mi plej ŝatas francojn”, diris Anja kun rideto, “mi tamen preskaŭ ne povas paroli la francan. Due, mi pensas, ke esperantistoj ĝenerale estas pli malfermaj homoj, pli bonkoraj; ili havas pli altan intelektan\* nivelon, eĉ se multaj estas frenezaj.”

Post paŭzeto Anja klarigis: “Por mi tiaj konatiĝoj nun estas la sola celo de Esperanto.”



“...Kvankam la origina\* celo estis io alia”, aldonis Bernard en afabla tono, por ne tro videble kontraŭstari al sia nova amatino.

“Jes, kompreneble. Komence, antaŭ ok jaroj, ankaŭ mi tre entuziasmiĝis\* pri la ideo de Zamenhof. Mi eĉ gvidis Esperanto-kurson en mia lernejo. Kaj mi veturis al preskaŭ ĉiu IJK, IS, IJF ktp; mi partoprenis en movadaj diskutoj, en jarĉefkunvenoj kaj komitatkunsidoj. Sed baldaŭ mi tediĝis\*. Mi renkontis ĉiam la samajn homojn, kiuj diris pri ĉiam la samaj problemoj ĉiam

la samon. Tiuj ĝisostuloj min naŭzas. Ili simple ne volas kompreni, ke Esperanto havas nenian ŝancon kontraŭ la angla.”

Nun Bernard sentis la voĉon de Anja ne plu ĉarma sed vunda. Sed li decidis kaŝi tion. “Jes, ankaŭ mi komence tre aktivis. Ankaŭ mi gvidis kursojn; mi fondis junularan grupon, mi verkis artikolojn por junularaj gazetoj.”

Li pripensis, kiel daŭrigi. Ankaŭ li eklernis la lingvon jam antaŭ ok jaroj; tamen la entuziasmo por la “interna ideo” de tiam konstante akompanis\* lin. Eĉ se li nun riĉiĝis je spertoj kaj jam delonge formetis kelkajn naivajn\* pensojn de novulo, li plu alte estimas

Zamenhof kaj ĉiujn, kiuj iel agas por “la afero”. Kaj li planas pliiĝi sian aktivadon. Aliflanke li ne volas esti malkaŝata kiel azena, ĝisosta movadano, por ne endanĝerigi la ek-naskiĝintan amon...

“Fakte ankaŭ mi iom tediĝis de la diskutoj. Ekzemple la strategiaj\* planoj en la Movado tute ne necesas, ĉar ĉiu aktivilo mem spertos, ĉu lia laboro estas agrabla kaj ĉu ĝi valoras la penon.”

“Jes”, konsentis Anja, “mi ankoraŭ ricevas kelkajn movadajn gazetojn. Mi ne plu povas elteni legi ilin. De jardekoj la samaj homoj parolas pri strategioj, ili diskutas pri -ata/-ita kaj la esperantigo de propraj nomoj, sen la plej eta progreso.”

“Sed ne forgesu, ke tio neniel signifas, ke Esperanto estas malbona afero”, fine rimarkigis Bernard, “la lingvo ja ĉiuokaze prezentas grandan ŝancon por plibonigi la internacian kompreniĝon...”

“En eta rondo. Ja nur malmultaj volas lerni la lingvon, kaj ni ne devigu la aliajn.”

Bernard decidis ŝanĝi la temon. “Ĉu nun, kiam vi ne plu laboras por Esperanto, vi aktivas por io alia?”

“Ne. Mi tute ne plu havas idealojn. Ĉar eĉ se realiĝas iu vizio\*, ĉiam sekvas la seniluziigo. Rigardu al

# KOJAKTO

## Jarkolekto 1994

Se vi ne ricevis nian revuon pasintjare, vi povas ankoraŭ aĉeti unuopajn numerojn!

Unuopa n-ro kostas 4 gl. Se vi mendas la tutan kolekton (6 n-roj), vi pagas nur 18 gl. Se vi mendas minimume 3 kompletojn, vi ricevas rabaton de 1/3 kaj sekve pagas nur po 12 gl.!

La prezoj inkluzivas sendokostojn. Por EU-landoj aldoniĝas 6% por imposto. Mendu ĉe UEA.



Orienta Eŭropo. Post la falo de la komunisma sistemo multaj homoj fartas eĉ malpli bone ol antaŭe.”

“Tamen libereco estas ŝanco por pliboniĝo”, opiniis Bernard.

“Sed ne, se la homoj ne kapablas eluzi tiun ŝancon.”

Bonŝance Bernard trovis kelkajn temojn, pri kiuj li povis pli amike diskuti kun Anja. Ili ambaŭ kontraŭis la francajn atom\*-bombajn\* provojn, kaj same la rusan invadon\* en Ĉeĉenio, eĉ se ĉio ĉi por Anja iom malpli gravis ol por Bernard. Jen kaj jen ili interrompis la diskutojn per interkisado kaj ĉirkaŭbrakoj, ĝis fine, je la tria horo, Bernard sentis la emon enlitiĝi. Anja proponis iri kune kun li.

Lumiginte lian ĉambron, ili vidis du geulojn en la lito apud tiu de Bernard. “Vidu, ni ne estas la solaj”, Anja signis per siaj okuloj. Mallonge poste ankaŭ en la lito de Bernard kuŝis du geuloj. Ili kisis, ĉirkaŭbrakis kaj karesis unu la alian; ili esploris reciproke\* siajn korpajn. Baldaŭ Anja endormiĝis en la brakoj de Bernard.

Bernard nek povis nek volis ekdormi. Lin maltrankviligis, eĉ pikis la miksitaj sentoj pri Anja. Unuflanke ŝi tre plaĉis al li, aliflanke li havis tute

alian opinion pri idealoj. Ĉu vere post realiĝo de vizio ĉiam sekvas seniluziigo? Certe ne. Se la homoj finfine sukcesus esence malpliigi la malpurigon de la medio, ĉu tio ankaŭ iel malutilus al la homaro? Ĉu la homoj en eksa Jugoslavio ne estus pli feliĉaj se finfine finiĝus la terura milito? Bernard ekzamenis ankaŭ tion, kion Anja diris pri la angla lingvo kaj la celo de Esperanto. Li klopodis rememori la Ĝenevan paroladon de Zamenhof, kiu tiom kortuŝis lin, kiam li legis ĝin unuafoje, antaŭ sep jaroj. “Anja volas elŝiri el mia koro ion sanktan”, li diris al si, kiam revenis en lian memoron la vortoj de Zamenhof el la dua UK.

Dume de la apuda lito apenaŭ aŭdiĝis amparolado esperantlingva. Sekvis ĝem\*-ado. “Ĉu tio estu ĉio, kio postrestis de granda ideo?”, li demandis al si. “Elŝiri el la koro ion sanktan”, li ripetis al si. Kaj li bedaŭris, ke nun li ne povis sciigi al Anja siajn pensojn, siajn sentojn. “Sed verŝajne ĉiukaze ne eblos ŝanĝi ŝian konvinkon, same kiel nenio povos ŝanĝi la mian...”

La venontan matenon Anja kaj Bernard komune forlasis la ĉambron. “Estis belega nokto”, diris Anja, kiam ili estis solaj en la koridoro\*.

“Nu”, rakontis Bernard, “mi multe pensadis pri vi. Kaj mi konkludis\*, ke vi estas tro supraĵa por mi.”

“Kion tio signifas?”, demandis Anja mirigite.

Bernard sentis superecon kaj memkompaton samtempe, kiam li eldiris: “Neniam plu vi kuŝos en miaj brakoj.”

- akompani:** esti aŭ iri kun iu
- atomo:** plej malgranda ero de materialo
- bombo:** detruilo, ĵetata de flugmaŝino
- bukloj:** areto da haroj pendantaj en e-formo
- ĉarma:** bele plaĉa pro ia neklarigebla kaŭzo
- entuziasmo:** forta emo al io
- ĝemi:** esprimi dolorajn sentojn per plendaj sonoj
- intelekta:** kapabla pensi pri aferoj kaj estigi rilatojn inter ili
- invadi:** perforte eniri kaj ekokupi fremdan landon
- karesi:** plaĉe tuŝi por montri sian amon, amikecon
- konkludi:** tiri finan ideon el diversaj faktoj
- koridoro:** trairejo, sur kiu malfermiĝas ĉambroj
- naiva:** sen-sperte malkaŝema kaj kredema, kiel infano
- origino:** komenco, deveno
- reciproka:** ago, sento aŭ efiko de unu kontraŭ dua ĝuste tiel, kiel de la dua kontraŭ la unua
- strategio:** arto lerte aranĝi rimedojn por venki
- tedi:** ĝeni per longa ripetado aŭ daŭro sen ŝanĝoj
- vizio:** io, kion oni kredas vidi kaj senti



Eŭterpa:

## Neniu ploras en Samarkand'

**Samarkand'**. 11 kantoj, plejparte de Ĵomart. Stokholmo: la aŭtoroj, 1994. (31 min.) Kun tekstoj. Prezo: 25,20 gld.

La etoso de la kantoj sur *Samarkand'*, la nova kasedo de Ĵomart kaj Nataŝa, ne esence diferencas de antaŭaj kasedoj. Novaj kaj pli bonaj estas la muzikaj aranĝoj, enhavantaj krom kantado kaj gitaro nun ankaŭ bekfluton kaj klavaron, kio donas pli da varieblecoj.

En la kantoj de Ĵomart kaj Nataŝa plejparte la kantoj tamen estas de Ĵomart sola — la melodioj kaj tekstoj estas harmonia tuto. Ofte la kantoj transdonas senton de melankolio kaj sopiro. Belaj, malbrujaj kantoj por pace auskulti.

Pri la mita Samarkando, loko de revoj, temas la titolkanto de tiu ĉi kasedo. Samarkando estas "fabela lando", en kiu "neniu ploras kaj ne

angoras". Simila revlando estas la urbeto de la juneco, en alia kanto ĉi-kaseda. En pli fruaj kantoj oni renkontas "someran mondon" aŭ "noktan landon", kiuj same estas bildoj de aliaj cirkonstancoj — de tempo aŭ loko, kie la vivo estas pli eltenebla ol en la brua, rutina vivas eĉ angoriga mondo, en kiu ni vivas ĉi tie kaj nun.

Malespero ne ĉeestas en la kantoj, sed ofte dubo. En kanto, kiu tamen havas la nomon *La espero lasas homon lasta* oni demandas:

*Sed pro kio estas longaj tagoj kaj konstante feston ni atendas?*

*Pretas ni por tio multe pagi, sed tre ofte ĝi neniam venas.*



Tre bela estas ankaŭ *Mia kara amik'*, kies muzikon kaj vortojn verkis Mihail Povorin. Laŭ temo — disiĝo kaj somero — kaj

metaforoj, ekz. "traj-

no de l' viv" — ĝi similas al la kanto de Ĵomart. Nataŝa kantas ĝin sola per sia alta, klara, anĝelsona voĉo.

*Maria Sandelin, Finnlando*

Ami kinon:

## Ne mortu sen diri, kien vi iros

Originala titolo: *No te mueras sin decirme adónde vas*

(Argentino, 1995)

(Kolora kaj nigrablanka)

Reĝisoro: **Eliseo Subiela**

Ĉefroluloj: **Dario Grandinetti, Jorge Martínez, Mariana Arias, Mónica Galán, Tincho Zabala, Leonardo Sbaraglia.**

Ĝi ekodi la elektrajn impulsojn de la cerbo en bildojn dum sonĝado ŝajnas ne tiom neebla se konsideri, kiom la homo jam atingis. Precize tion provas fari du amikoj, amatoraj inventistoj. Nur ke ili tute ne kalkulis kun la

internaciaj premioj ĉefe per du el siaj filmoj: *Viro rigardanta la sudokcidenton* (*Hombre mirando el sudoeste*) en 1986 kaj *Lastaj bildoj de la ŝippereo* (*Últimas imágenes del naufragio*) en 1989.

La mekanikisto, lia edzino, Rochele kaj Carlitos — roboto kun voĉo de Carlos Gardel (dublita de la kantisto Jairo), sukcesas la plej bonan komponadon. Tincho Zabala, la maljuna posedanto de la kinejo, refoje ludas sin mem. Kun tia temo, kompreneble, ne povis manki specialaj efektoj, kvankam plej impresas la scenoj en la transmondo kaj la nigrablankaj en la epoko de Edison. Subiela uzis ĉiujn eblajn kinteknikojn (aparte observu la efekton pri aŭroj — ŝajne simplaj skrapaĵoj sur la filmo), kio jam havigis al li laŭdojn de internaciaj recenzistoj.



*Rochele (Mariana Arias) serĉas sian amaton en la transmondo.*

interfero de tria homo: Rochele, la edzino de Edward, helpanto de Edison en la pionira registrado de moviĝantaj bildoj. Ŝia spirito trovas vojon videbliĝi dank' al "sonĝ-kolektilo" kreita de la menciitaj inventistoj kaj tiel eniras la vivon de unu el ili, Leopoldo, por komplete ŝanĝi ĝin. Tiam komenciĝas surprizoplena kunvivado, en kiu li povas vojaĝi tra la tempo kaj ricevi vizitojn de mortintaj homoj, i.a. de la famaj "malaperigitaj" de la iama argentina diktaturo. Ĉio nepre ligita al kino — li ja estas projekciisto, kiel siatemppe lia patro.

La tre densa rakonto neniel permesas, ke la atento iam falu dum la 2 horoj kaj 10 minutoj de tiu ĉi freŝega futurisma fantaziĝo de la granda reĝisoro Eliseo Subiela, kiu jam kaptis amason da

Kiel aliaj argentinaj filmoj lastatempaj, ankaŭ tiu ĉi eniras mondan distribu-reton — do klopodu trafi ĝin. Ĉefe se vi estas revulo. *No te mueras...* enkorpiĝas la grandajn sentojn kaj provas respondi la grandajn demandojn de la homaro: la angoro pri la vivo kaj la timo pri la morto, kiun rolon la homo havas sur la Tero, la amo malgraŭ la tempo kaj eĉ la temo de universala lingvo estas tuŝita — ĉio meze de zootropoj\*, projekciiloj kaj sonĝ-kolektiloj. La tuto kunfluas por redoni tre inĝenian, belan kaj neforgeseblan pladon indan je la centjarigo de la arto, kiu plej fideinde bildigas niajn revojn: kino.

*Franĉjo Veuthey*

**zootropo:** praprojekciilo (vd p. 4.)

## Organizaj problemoj (rezulto)


La konkurso *Organizaj problemoj* de KONTAKTO 147 (1995:3) partoprenis entute 22 homoj el 19 landoj. La fortuno decidis pere de la manoj de William Auld, kiu tiutage vizitis la CO-n, ke la du libropremiojn gajnis **Niko Sarmiento** el Hispanio kaj **Flavia Dal Zilio** el Italio. Gratulon al ili!

### Solvo

Lundo	Blat-amantoj	Kotorat	Ĝoĝo Els
Mardo	Atestantoj de Zamovo	Ŝlajr	M. Lip Haro
Merkredo	Postneologistoj	Kac	Nu Jen Mi
Ĵaŭdo	Vesperto-bredistoj	Krimaĉo	Fark Meteŝ
Vendredo	Nifo-gvatistoj	De Beldors	Ansa Bacchisi

### Klarigoj

Prezidanto de la vesperto-bredistoj ne estas Ĝoĝo Els (vidu indikon 4), nek M. Lip Haro (indiko 2), Nu Jen Mi (indiko 6) aŭ Ansa Bacchisi, ĉar ŝia kunveno okazis en alia tago (indikoj 3 kaj 4). Do la prezidanto de tiu jaŭda kunveno povas esti nur Fark Meteŝ. La kunveno en ĉambro Kotorat prezidata de Ĝoĝo Els ne okazis merkredon (7), nek jaŭdon (4), nek vendredon (3). La atestantoj de Zamovo, prezidataj de M. Lip Haro, ne renkontiĝis jaŭdon (4), nek vendredon (3), nek en ĉambroj Krimaĉo (2) aŭ Beldors (5). La vesperto-bredistoj ne renkontiĝis en ĉambro Ŝlajr (4) aŭ De Beldors (5), nek en Kotorat, ĉar tie prezidis Ĝoĝo Els, nek en Kac, ĉar tie oni kunvenis merkredon. Do restas nur Krimaĉo. La atestantoj de Zamovo renkontiĝis du tagojn pli frue (2), do evidente temis pri mardo. En merkredo ankaŭ ne kunvenis Ĝoĝo Els, Ansa Bacchisi aŭ Fark Meteŝ, do restas nur Nu Jen Mi, kaj en tiu kazo Ĝoĝo Els en ĉambro Kotorat povis prezidi nur lundon. Ĉambro De Beldors ne estis uzata mardon, ĉar tiam renkontiĝis la atestantoj de Zamovo, do kiel sola ebleco restas Ŝlajr, kaj De Beldors estis uzata vendredon. Tio signifas, ke la kunvenon de la nifo-gvatistoj prezidis Ansa Bacchisi (3 kaj 5). Merkredon ne renkontiĝis la vesperto-bredistoj (4), la nifo-gvatistoj aŭ la atestantoj de Zamovo, do restas nur la postneologistoj kaj la blat-amantoj. Sed Nu Jen Mi malŝatas blatojn, do evidente li prezidis la postneologistojn, lasante la blatojn por Ĝoĝo Els.



Tibor Sekelj

## Kumeŝaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

*Kumeŝaŭa, la filo de la ĝangalo*, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Libro:

## Blindulo klarvidanta

*El vivo de la ĉukĉoj.*

Vasilij Eroŝenko (1890-1952).  
Moskvo: Impeto/Ruthenia, 1992.  
47p. 21cm. Prezo: 4,50 gld.

**N**e kreu ĉion en tiu ĉi verko!  
Tamen fakte, ke la mult-  
vojaĝinta Eroŝenko dum 1928-29

gastis ĉe sia frato, veterinaro en rusa bazo inter aborigenaj ĉukĉoj apud la Beringa Markolo. Poste li sendis pri tio siajn brajle skribitajn "skizojn" al *ESPERANTA LIGILO*, revuo de blinduloj.


Unue ni legas pri Filip, juna fiŝisto ĉe la rivero Anadir. Tie la miŝistoj preskaŭ vane klopodadis kristanigi la ĉukĉan popoleon. Al la junulo pli kaj pli perdanta la vidkapablon ne utilis cervo-ofero dum ceremoniaj traktoj de ŝamano. Ankaŭ ŝmiro per sanktaj akvo kaj oleo de la popo ne helpis, nek kisoj aŭ vipoj al la ikonoj. Kuracisto preterpasante el Vladivos-toko konsilis veni al Leningrado —

preskaŭ aliflanke de la mondo, tamen Filip pretis. Kiam en julio armeoj da trutoj plenigis la riveron, tagnokte, senlace li kaptis per retoj kaj nudaj manoj. Helpis al li fratoj, kuzoj, nevoj, sed ne sufiĉe, ĉar "la perlaborita mono iel per si mem trafluus inter la fingroj kaj la multaj poŝoj de liaj sennombraj parencoj."

En dua rakonto rolas granda cervobredisto Umka kun kvar edzinoj — nur mankadada infano. Finfine naskiĝas blinda knabo. Ĉiuj atendas, ke la patro fermu la fingrojn ĉirkaŭ lia gorĝo, sed kvazaŭ en tranco kun sia favorcervido li destinas ne nur vivon, sed senliman paciencon kaj instruadon al Kejgin. Eviti la fajron, stangojn de la feltendo, fosejojn, terbulojn, ŝtonegojn, rekoni la bojon de ĉiu opa hundo, trakti alenon kaj martelon —

fine eĉ konstrui sledon.

Dudekjara Kejgin perdiĝas en melankolio. Sed ankaŭ tion la patro primajstras. Li glitveturas sepcnt kilometrojn por konvene svati sian filon. Legonto, antaŭĝoju legi pri tragedio kaj triumfo de Kejgin i.a. lernonta la dancon de l' rosmaro!



# tentaklo

Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso.  
La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

### Monstroj

Kiam oni kelkfoje kontemplas, kiom da senhumuraj mem-kontentuloj ekzistas en la Movado, mi nur ĝojas, ke mi neniam apartenis al ili! Mia artikolo *Monstroj ĉirkaŭas vin* (*KONTAKTO* 146, 1995:2) evidente kontribuis al la malkovro de unu tia argulo.

*inat Terzi, Eŭropo*

### Konvinkigo

Vidante novan numeron de *KONTAKTO* mi denove konvinkigis, ke ĝi estas kvalite, aspekte kaj enhave avangarda en Esperantujo kaj sen ajna dubo apartenas al la plej interesaj Esperanto-periodaĵoj. Mi deziras gratulojn kaj novajn sukcesojn!

*Anatoli Ionesov, Uzbekio*

**ĜUSTIGO:** Komence de la tria alineo de la artikolo *Modela Un-sembleo en Esperanto* (p. 7) en *KONTAKTO* 148 (1995:4) enŝteliĝis eraro. Ĝi devas teksti: *La rezolucio jam de la komenco estis malboneta [...] kaj fine malbonega kaj... malakceptata!* (Grase aperas la ĝustaj formoj). La redaktoro pardonpetas!

Kun viaj kontribuoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. *KONTAKTO* antaŭdankas!

*La trimova ŝakproblemo* estas amara koktelo de fanatiko kaj antaŭjuĝo. Estroj de la arka bazo volas levi la "moralan" nivelon de ĉukĉaj sovaĝuloj al komunismo. Herezulo indiĝena rebatas, ke rusoj ne instru sed lernu de ĉukĉoj komunismon! Klare, ke tia novelo povis aperi nur samizda-

te\*. Ke okazis publikigo en Sovetio en 1947, 1974 kaj 1984 laŭ enkonduko de N. Gudskov ŝajne nur povas ŝuldiĝi al tio ke tiuj cenzuristoj, kiuj komprenis Esperanton, ne kompetentis ankaŭ pri brajlo!

*Poul Thorsen, Danio*

samizdato: verko ne leĝe eldonita

# Nia plej juna leganto

Laŭ ĝepaĉioj  
Roel Haveman kaj  
Marwine van der Molen  
el Nederlando, ilia ido  
Machiel estas la plej  
juna leganto de  
*KONTAKTO...*

Se ne venos protestoj  
pro malkovro de iu alia,  
eĉ pli juna leganto, nia  
redakcio oficiale  
agnoskos tiun ĉi kiel la  
efektive plej junan (kaj  
etan) leganton de nia  
revuo. Eĉ se, laŭ la foto,  
la legata numero ne  
fion plaĉis...

recenzomano




# Koloro

facila

VIDU, IU DE EKSTERE.  
ĈU NI INVITU LIN ENIRI?



NENIEL. NI MEM JAM TROAS.  
NU, VENAS PLIAJ.



ILI MALTRAN-  
KVILIGAS MIN.  
ANTAŬJUĜOJ.



MI ANTAŬJUĜEMA?  
DO, MI MAL-  
FERMOS AL ILI.



TIO ĈI NENIAM  
PLU ESTOS  
KIEL ANTAŬE.  
ĈU VI DEZIRAS ENIRI?  
MOMEN-  
TETON.



POR KE  
ESTU  
KOLORO.

EL "SOMOS DIFERENTES SOMOS IGUALES" KON AFABLA PERMESO DE LA ARTISTO KAJ DE LA ELDONANTO. HISPANA KOMITATO DE LA EUROPA JUNOLARA KAMPANJO KONTRAŬ RASISMO, KSENOFOBIO, ANTISEMITISMO KAJ MALTOLERANCO.

Barris 75